# *Meksiko havas proponon por Trump kontra? lia dogana milito*



**Foto: Carlos Santiago / Gettyimages.ru**

Havano, nov 30 (RHK) Meksika Ekonomia Sekretario Marcelo Ebrard certas, ke stre?i?oj pri la minacoj de komercaj sankcioj de usona prezidento Donald Trump malpliforti?os kun la tempo.

Ebrard menciis, ke Meksiko havas pretan proponon, sed ankora? ne povas prezenti ?in, ?ar oni petis lin esti singarda.

La minacoj de Trump inkluzivas 25% plialtigon de tarifoj al Meksiko kvaza? pune al ?ia enmigra politiko, al kiu la ?tatestro, Claudia Sheinbaum, respondis, ke ili anka? povus pliigi impostojn al Usono.  Post voko

inter amba? gvidantoj, la prezidento neis la eblecon "dogana milito".

Ebrard anka? komentis ke strategio "imposto kontra? imposto" ne povas esti aplikita, memorante malsukcesan provon en 1971.

Fonto: RT

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/370972-meksiko-havas-proponon-por-trump-kontrau-lia-dogana-milito

**Radio Habana Cuba**